É 100% Regular

Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.

Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

GISTO, NOV,20.10
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj.
Krom foraj loĝantoj,R$1,00.

.....

GRAVA VIZITANTO

La dekkvinan ĉimonatan GEA akceptis nian amikon Egon Breitenbach por prezenti paroladon pri sia projekto de lingvo nomata Facile. Laŭ lia aserto la ideo prosperas, pli en la Eŭropa Unio ol inter ni. Se mi ĝuste kaptis la enhavon Facile emas esti la lingvo de la penso. Pluraj aŭskultantoj riskis demandojn kaj diskutis kun Egon altnivelan lingvistikon kiun, mi konfesas, ne kapablis plene kompreni. Egon asertis ke jam ekzistas konsultlibroj pri Facile en la angla, franca, germana k.a. Sciatas ke li ankaŭ bone regas Esperanton. Laŭ supraĵa analizo de la lingvo ĝi kaŭzis al mi la impreson ke lernanto devas parkere scii multe pli da eretoj ol E-lernanto ĝis li/ŝi kapablos legi kaj kompreni ties tekstojn. Rimarkeblas ke, inter esperantistoj pokaj homoj emas forgesi sian scion por adopti la lingvon Facile. Egon laŭtlegis teksteron en Facile, por ke ni, la aŭskultantoj havu ideon pri kiel sonas tiu idiomo. Verdire, ne malbela sed mi, sen posedi minimuman scion pri ties gramatikaĵoj fariĝas kvazaŭ stulta azeno antaŭ moderna lifto. Se teksto avertas pri danĝero mi povas fali en kaptilon. Ni restu fidelaj al nia amata Esperanto!

>>> Jen unu plia rakonto de historia okazintaĵo lerte surpaperigita far la ĵurnala kolumnisto kiu ĉiusemajne plezurigas milarojn da fidelaj legantoj. Almenaŭ al mi ili tre plaĉas krom kelkaj kiuj prikomentas politikajn fifarojn nialandajn:

BONUZO DE TOMATOJ

Far D.Koimbra – ZH

Al mi maleblas imagi vivon sen tomatoj. Ne specife pri la propra tomato sed pro ĝiaj noblaj derivaĵoj, la saŭcoj densaj kaj bongustaj, bonodoraj, kiuj specife karakterizas pastojn. Nuntempe ankoraŭ ekzistas homoj kiuj konsideras ilin same kiel ili estas. Ili alprenas kaj mordas ĝin same kiel ili farus en...pomon. Barbaroj. Koreanoj tiel faras. Eĉ ne aldonas ĝin al salatoj. Por ili tomato estas frukto konsumata kruda, sen ornamoj aŭ solenaĵo. Barbaroj, barbaroj.

Ne klarigeblas kial la homaro travivis mil jarojn sen ĝui la tutaĵon kiun tomato disponas. Nur en la 15a. centjaro napolitanoj ekkomprenis ĝiajn specifajn ecojn. La tomato estis ĝuste veninta de la Amerikoj. Tiutempe la sudaj italidoj kutimis manĝi iun densan panon, iel aspektante torton nomatan picea. Certan tagon iu napolitana kuiristo iom pli kuraĝa spicis la supraĵon picean per salo, olivoleo kaj aromaĵoj kaj sur tiun kovraĵon pecetojn el tomato. Sekve li metis la tutaĵon en fornon. “Presto!” inventiĝis la pico.

Alia produkto amerika elstare plibonigita de eŭropanoj estis la terpomo. Al la kruela Francisko Pizzaro, la detruinton de la INCA-imperio, oni atribuis la importon de la unuaj terpomoj en la malnovan kontinenton sed la nomo laŭ kiu ĝi fiksiĝis estas ago de anglo, la pirato Francisco Drake. Okazas ke meze de la

16ª.jarcento Drake enhaveniĝis ie en Centra Ameriko kaj la maristaro estis bonsukcesa dum kontaktoj kun la indiĝenoj. Tiel bone ke unu el ili enamiĝis al la filino de la chefo, linda junulino kies nomo estis Potato. Kiam la angloj pretiĝis por la adiaŭo, la chefo levis unu brakon kaj: Momenton! Li protestis kaj fingromontris la logintan maristo. “Tiu devas edziĝi al mia filino”.

Drake diris jes...jes sed planis ion. Dum la nokto li kunvenigis sian skipon, silente enbarkigis la maristaron, levis ankron kaj fuĝis. La indiĝenoj postkuris la maristojn, pafis lancojn kaj sagojn. Kiam la municio finiĝis, ili ĵetis terpomojn. Drake decidis arigi kaj kunporti kvanton da tiuj terpomoj. Alvenintaj en la Bela Albion, preparigis kaj servis ilin al Elizabeth-I alnomata La Virga, kiu malgraŭ la kromnomo estis lia amatino. Dum la bankedo ŝi demandis al Drake la nomon de la manĝaĵo. Li pafis signifan rigardon al sia amiko maristo savita el edziĝo kaj respondis – Potato. Ĉu ĝi ne estas bela estorio interkontinenta?

Faktas favoremaj la interŝanĝoj inter diferencaj mondopartoj. Same de Ameriko venis ĉokolado, sublimata de svisoj. Kaj la maizo kies spikoj komence estis etaj, nur poleksograndaj. Fazeoloj, kukurboj, tabako, pimentoj, la dolĉa manioko nomata aipim nete brazila.La afrika mango.La Aŭstralia eŭkalipto. Komence eŭropanoj portis al Ameriko animalojn jam ekzistintajn, kiuj estingiĝis dum la Glacia Erao, ĉevalo, krom bovino, porko, kaprino, la simpatia kuniklo.

Nun diru al mi, ĉu iu povas ankoraŭ kontraŭi la globaligon?

BONA ESPERO

Ni ĉiuj revenu al la varma temo:INCENDIO. Post nia lasta Verda Kafo nenio envenis pri la afero proponata de mi al niaj gerondanoj. Mi proponis ke ĉiu el ni oferu iom helpe al tiu grava organizaĵo. Unu foston de ĉiu, ili petas, inkluzive ĝi proponas surskribi ion memore al nia gesto. Montroekzemple mi proponas miaflanke du fostojn. Mi petas al amiko Zagetto teni la kason por akcepti donacojn, sendotajn al Bona Espero fine de Decembro/2010. Bankaj elspezoj ne okazas, do facila tasko. Certe ĉiu konsentos ke tiu FAZENDA ESCOLA estas unika trezoro en Esperantujo, pri kiu ni rajtas fieri kaj iam la Plej Supera Mistera Forto tiklos sinjorinon FORTUNA por ke bonsorto alportu kapitalon pli ol sufiĉan por konstruigi vere tre allogan Rezidejon, avide alflugatan, por helpi kaj samtempe ĝui tiean klimaton.

En la momento ni devas kompreni la preman neceson refari la liman barilon ĉar brutaro invadas, tretaĉas legumejojn, formanĝas fruktarbojn, invadas kortojn, detruas akvajn instalaĵojn, ktp. se ne daŭre iu deĵoras kaj forpelas...

El Ĉinio, rekte al mi. ĝis nun, neniu signo pri subteno. Altaj instancoj ankaŭ tie ne urĝas...

BV almenaŭ rideti.

SURPRIZA VIZITANTO

Elegante vestita viro frapas la pordon de de domo kie loĝas sinjorino. Post la salutoj la nekonatulo demandas:

- Ĉu vi havas gejunulajn gefilojn,? – R : tute ne.
- Ĉu vi muzikas, kantas ? – R : -Ne
- Ĉu vi havas papagon ? R: ne, mia sinjoro, sed diru al mi, kial tiom da demandoj, ĉu vi estas kontrolisto, pri kio?
  - Ne, kara sinjorino, mi kandidatas aĉeti vian najbaran domon.

Ĉu tro velka ? Vi ne ensendis pli pikan anekdoton...sry.